Robert Eadie	Lieut. R. C. Marble	J. Vidack
Richard Earnhart	Frances L. McDowell *	M. Villareal *
John E. Falk	A. S. Mellichamp	Victor A. Welman
Mrs. Cora L. Fellows *	Miss E. J. Merriam	Dr. Lehman Wendell
Dr. G. P. Ferree	Theo. L. Miles	Albert Whitworth
Lillian E. Fuller *	Edward D. Moore	Workmen's Benefit 276
James H. Furay	R. T. Mulligan *	Mrs. Flora Wyman *

## AN APPEAL FOR HELP

Christmas and New Year are approaching, and people in many lands are hungry and cold. Thousands of our "samideanoj" are among them. Many of our readers have been sending food and clothing to their old Esperantist friends and correspondents overseas. We hope, however, that a number of readers will want to aid one or the other of those listed below. All of them are particularly worthy of consideration. Parcels up to 11 pounds may be sent directly by mail. Larger packages (excellent value for \$10), may be ordered through CARE (Cooperative for American Remittances to Europe, 50 Broad St., New York 4, N.Y.). Here is our selected list:

Dr. Wanda Zaleska (Zamenhof), Lowicka 39a, Mokotow, Warszawa, Poland.

S-ro Bela Bleier, Hargitta U. 10, Csakyliget, Pest megye, Hungary — now in charge of the group around *Literatura Mondo*.

Dr. Leona Zambrooska, Parlamenta Bibliotekistino, Esperanto-Rondo en la Hungara Parlamento, Parlamento, Budapest, Hungary.

S-ro Walter Mudrak, Beatrixgasse 19/9, Wien III./40, Austria. A leading Esperantist for 30 years, was active in anti-Nazi Underground.

Dr. Ernst Goerlich, Messenhausergasse 4, Wien III, Austria. An Espe-

rantist and anti-Nazi of long standing, now Editor of Esperanto Page in Austrian teachers' journal.

S-ro Alexis Govals, Greifenburg 55, Carinthia, Austria. Chief Delegate, Society of Friends of Esperanto, for Austrian Refugee Camps.

S-ro Peter Heinrich Klein, (22a) Essen, Damrathkamp 28, Nordrhein-provinz, Germany, British Zone. Active for Esperanto for 30 years, always anti-Nazi.

S-ro Josef Grundhoff, (22a) Wuppertal-Barmen, Eichenstrasse 56, Nordrhein-provinz, Germany, British Zone. An Esperantist and anti-Nazi.

S-ro Otto Pellikainen, "Esperanto-Airut," Seinajoki, Finland. Edits Esperanto paper. Clothing and Esperanto books urgently needed. They will be sold to finance Esperanto paper. Donors will receive paper free. Also needed chrome paper for photo prints.

We have also several requests for "Affidavits of Support" from persons (mostly Displaced Persons) who wish to come to the United States. One which is particularly worthy of attention is a Ukrainian Esperantist now in an Austrian camp. UNRRA is willing to pay for his transportation, but Affidavit is urgently needed. Won't someone help? Particulars on request.

Wish them a Merry Christmas — by deeds, not by words alone!

---

### ATENTINDA ALVOKO

Hungarlando, pro tutlanda mizero kaj malsato, bezonas urĝan atenton. Multaj samideanoj tie havas nek vestaĵojn nek nutraĵojn. Feliĉe, ni rimarkas ke preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj en la mondo presas bonan novaĵon, ke S-ro Bela Bleier (vidu adreson supre) estras help-komitaton kune kun Baghy, Balkanyi, kaj Kalocsay, al kiuj

oni povas sendi helpon. Feliĉe, ankaŭ, ĵus starigis grupo en Nov-Jorko por peradi pakajojn por tiu komitato. Sendu ĉefe vestaĵojn ĉu novan ĉu uzitan, kaj kontribuu sumeton por sendkosto, ktp. Por plia informo turnu al: *Ralph R. Bonesper, Apt. 5D, 461 West 44 St., New York 18, N.Y.* Li estras la lokan komitaton.



# POST BELA KONGRESO

BABI LE MULO

La anoj de la 36-a Kongreso de la Esperanto - Asocio de Nord - Ameriko (EANA) iris hejmen kun la konvinko, ke ilia Asocio estas sur bona vojo kaj ke ĝi meritas ilian daŭran subtenon. Ili decidis duobligi kaj dekobligi klopodojn por varbi novajn membrojn kaj doni al la Asocio la idean, organizan kaj financon fort-econ, kiun ĝi bezonas por la disvastigo de Esperanto en Usono kaj Kanado kaj por ĝia enkonduko en la internacia vivo.

La kongresanoj aŭdis kun plezuro en raporto de la Generala Sekretario, S-ro George Alan Connor, ke la nombro de membroj de EANA preskaŭ duobligis de post la komenco de la jaro. Raporto de la Estro de la Financa Komitato, S-ro Viktoro Murajo, montris, ke la financa stato de EANA estas favora. D-ro Wilhelm Solzbacher, Kunredaktoro de "Amerika Esperantisto," klarigis la principojn kaj metodojn, laŭ kiuj AE evoluis en la lastaj jaroj, fariĝante unu el la plej bonaj kaj interesaj gazetoj en la Esperantomovado. S-ro Glenn P. Turner, Estro de la Komitato pri la UNO-Petskribo, raportis, ke en Aŭgusto estis ricevitaĵoj jam pli ol 4,500 petskriboj kaj ke la nombro kreskas rapide ĉiutage. Profesoro Edwin L. Clarke, Estro de la Ekzamena Komitato, S-ro Ernest G. Dodge, Direktoro de la Libro-Pruntservo, kaj S-ino Frances McDowell, Direktorino de la Rondo de Librolegantoj, pruvis per interesaj raportoj, kiom da valora laboro por Esperanto ili faras senbrue, sed senĉese kaj sindone.

La plimulto de la kongresanoj vidis je la unua fojo la Prezidanton de EANA, S-ron Robert Karlson el Montreal. Ni ĉiuj tuj multe ŝatis lin kaj S-inon Karlson kaj admiras la celkonscian kaj efikan manieron, en kiu li gvidas la Asocion. Ni ankaŭ

pensis kun bedaŭro pri la malbona sanstato de D-ro Cecil Stockard, Eks-Prezidanto de EANA, kiu estus tiom ŝatinta ĉeesti la Kongreson. La Kongreso decidis unuvoĉe, sendi al li specialan salutleteron.

La Kongreso okazis de la 11-a al la 14-a de Aŭgusto en Conway, en la Stato New Hampshire. Ĉar la vojaĝ-kaj hotel-malfacilaĵoj, kiuj estas rezulto de la milito, estas ankoraŭ grandaj en Usono, estus estinte malfacile kaj preskaŭ neeble, organizi kongreson en granda urbo. La Estraro decidis, ke almenaŭ laborokunsidoj estus necesaj. Oni do akceptis arangon kun S-ro Charles Frederick Weller, kiu proponis la uzon de la domoj kaj aliaj posedaĵoj de la Centro por Mondfrateco (World Fellowship Center), kiun li fondis antaŭ kelkaj jaroj. La nombro de kongresanoj estis pli alta ol oni estis antaŭvidinta, kaj tio kaŭzis, ke ĉiuj domoj estis tute plennaj kaj ke la Centra Oficejo estis devigata averti malfrue aliĝantajn gesamideanojn, ke mankos loko por gastigi ilin. Aliĝis 117 personoj, kaj efektive ĉeestis 51. Ili venis de multaj regionoj de Usono kaj Kanado, de Florida ĝis British Columbia, de Oklahomo ĝis Maine. Inter ili estis junuloj kaj maljunuloj, novaj kaj malnovaj Esperantistoj. La bona kunlaboro de diversaj Esperantistaj "generacioj" montriĝas en la nuna Estraro de EANA, kiu konsistas el unu membro, kiu estas Esperantisto de post antaŭ la unua Mondmilito, el alia, kiu venis en la movadon inter la du militoj, kaj el tria, kiu fariĝis Esperantisto nur antaŭ kelkaj jaroj, dum la dua Mondmilito.

La regiono de Conway estas tre bela, kun montoj, lagoj, riveretoj. Unu matenon grupo da 13 (!) Esperantistoj, gvidata de nia ĉina samideano Yitkon Ho, komencis je la 5-a ma-

tene grimpi sur Monton Chocorua, sur kies pinto oni altigis Esperanto-standardon. La gesamideanoj multe ŝatis promeni en la arbaroj, naĝi en la lagoj kaj veturi en remboato al insulo en Lago Whitton. Sur la insulo oni trovis bongustajn bluberojn kaj romantikajn kaŝejojn.

Ĉeestis ankaŭ kelkaj ne-Esperantistoj, amikoj de la Centro por Mondfrateco. Ili interesiĝis pri Esperanto, kaj kelkaj el ili jam fariĝis membroj de EANA. Inter ili troviĝas dentistino, kiu iam, antaŭ la unua Mondmilito, kiam ŝi studis en Varsovio, konatiĝis kun D-ro L. L. Zamenhof.

Kune kun la Centro por Mondfrateco, EANA organizis publikan kunvenon la 13-an de Aŭgusto. S-ro C. F. Weller kaj D-ro Jay Holmes Smith priskribis la historion kaj principojn de la Centro por Mondfrateco kaj esprimis sian simpatian kaj intereson por Esperanto. S-ro Robert Karlson prezentis la Esperanto-Asociacion de Nord-Ameriko kaj montris ĝian rolon, disvastigi Esperanton sur neŭtrala fundamento kaj en praktika kaj efika maniero. D-ro W. Solzbacher, kiu estas bone konata fakulo pri internaciaj aferoj, faris paroladon pri "Mondorganizo kaj Mondlingvo," analizante la lingvan problemon en la internacia vivo, ekzemple en la Unuiĝintaj Nacioj (UNO), kaj pruvante, ke nur la enkonduko de neŭtrala Interlingvo povas solvi ĝin. La parolado estis plena de faktoj kaj personaj spertoj el multaj landoj. S-ro G. A. Connor paroladis pri la temo: "Kiel Laboras la Esperanto-Movado," klarigante la organizon de la movado kaj urĝe petante ĉiujn ĉeestantojn, ke ili klopodu, por ke EANA fariĝu pli granda kaj pli forta. Fine—por multaj personoj tio estis la plej interesa parto de la Kongreso — tuta baterio da Cseh-instruistoj prezentis okulfrapan demonstracion de la Cseh-metodo de Esperanto-instruado. F-nno Roan Orloff kaj S-ino Doris Tappan Con-

nor donis la lecionojn, dum ke S-ro Armin F. Doneis kaj S-ro G. A. Connor ludis la rolon de Cseh-metodaj "traduk-aparatoj."

Unu fakto estas certa: Neniu enuis en Conway. F-ino Grace Randolph servis kiel unupersona Loka Kongresa Komitato (kvankam ŝi ordinare loĝas en Florida) kaj gajnis la dankon de ĉiuj por la interesaj vesperprogramoj, kiujn ŝi organizis. Ĉiuj admiris precipe la belegan kantadon de nia hungara samideano Nicholas Torzs. La Interkonatiĝa Vespero fariĝis interesa per la rakontoj de ĉiuj kongresanoj pri ilia laboro por Esperanto kaj pri la maniero, en kiu ili fariĝis Esperantistoj. En alia vespero oni organizis "demando kaj respondo"-kunsidon, dum kiu la "eminentuloj" respondis al multaj demandoj pri la lingvo kaj la movado.

Oni ofte aŭdis en Conway, ke la Esperanto-movado en Nord-Ameriko bezonas modernajn, teknike perfektajn kaj belajn propagandilojn kaj lernilojn. Estas necese montri al la publiko, ke Esperanto estas serioza afero, ne ludilo aŭ sporto por stranguloj, kaj ke ĝi estas uzata de praktikaj homoj en multaj fakoj de la internacia vivo. La kongresanoj do entuziasme akceptis la sciigon, ke baldaŭ (en Novembro) aperos en grava libro-eldonejo en New York tute moderna libro pri Esperanto. Ĝi konsistas el 6 partoj: (1) studo pri la lingva problemo kaj ĝia solvo, (2) lernolibro, (3) legolibro, (4) gvidlibro tra la Esperanto-movado kaj enkonduko en la praktikan uzon de la lingvo, (5) vortaro Esperanta-angla, (6) vortaro angla-Esperanta. La ĉefaj aŭtoroj de la libro estas G. Alan Connor, Doris Tappan Connor, D-ro W. Solzbacher kaj Pastro D-ro J. B. Se-Tsien Kao.

En la elektoj Profesoro Edwin L. Clarke, Winter Park, Florida, estas elektita Vic-Prezidanto, S-ro Joseph Leahy, Washington, D. C., Kunestro

de la Aga Komitato, S-ro Viktoro Murajo, New York, Kasisto de EANA. La membroj havos okazon aprobi aŭ malaprobi tiujn elektojn en skriba voĉdono.

Ĉiuj kongresanoj konsentas, ke la Kongreso en Conway estis harmonia kaj konkorda kaj ke ĝia sukceso permesas al la movado rigardi en la estontecon kun multe da optimismo kaj espero. Kompreneble ekzistis diversaj opinioj pri kelkaj aferoj, ekzemple la plialtigo de la membro-kotizoj. La problemo estos studata dum la venonta jaro, kaj la 37-a Kongreso faros decidon. Tamen ĉiuj kongresanoj konsentis, ke EANA bezonas pli multe da mono por fari pli efikan laboron.

Oni bone komprenis, ke la favora financa stato estas dankata al la fakto, ke neniuj salajroj estas pagata de EANA kaj ke ĉiu laboro en la Centra Oficejo estas farata senpage. Kompreneble la Esperanto-movado

ĉiam multe dependas de personoj, kiuj estas pretaj oferi siajn noktojn, dimanĉojn kaj libertempon por Esperanto. Sed asocio kiel EANA bezonas bone ekipitan oficejon kun salajrataj oficistoj por la regula administra laboro, tiel ke la tempo kaj talentoj de la estraranoj povas esti uzataj por aliaj laboroj kaj por la disvastigo de Esperanto en novaj fakoj.

EANA, kvankam ĝi estas nun pli forta ol en antaŭaj tempoj, estas malgranda kaj malforta kompare al la taskoj, kiujn ĝi devus plenumi, kaj kompare al la Esperanto-movado en aliaj landoj. Ne estas inde de la landoj de Nord-Ameriko, ke ilia Esperanto-movado estas pli malforta ol tiu en Nederlando, Svedujo aŭ Ĉekoslovakujo. Usono nun estas unu el la plej gravaj kaj potencaj landoj en la internacia vivo. Estas nepre necese, ke ĝi havu fortan, multnombrian, bone organizitan kaj centprocente efikan Esperanto-movadon.

## ESPERANTISTOJ DE KANADO

La fervoro por Esperanto, de la kreskanta Kanada Fako de EANA, montriĝis ĉe la 36-a Amerika Esperanto-Kongreso. *Prezidanto Robert Karlson* de Montreal persone prezidis. Li ĉeestis kun sia edzino kaj filo. Ankaŭ *Kapitano Wm. M. Doran* de London, Kunredaktisto de AE, partoprenis. Li venis kune kun amiko *R. T. Mulligan* de London. Aliaj Kanadanoj kiuj partoprenis: *D-ro F. Mancuso* de Montreal; *Arcade Trudeau* kaj edzino de Montreal; kaj *Yitkon Ho* de Vancouver, nia tre ŝatata ĉina samideano kiu vojaĝis trans la tutan

kontinenton por ĉeesti la kongreson.

Aliaj kanadaj samideanoj aĉetis kongres-kartojn, kaj lojale subtenis kaj sekvis la agadon ĉe la kongreso: *Elven J. Bengough* de Hamilton; *Edward Collins* de Hamilton; *D-ro P. L. Pratley* de Montreal; *Ernest Samuelson* de Garibaldi, B.C.; *Doris Saville* de Vancouver; *Albert Whitworth* de Thorold, Ont. La movado multe ŝuldas al nia kreskanta Kanada esperantistaro. Ni petas, sendu la novaĵon tuj por la sekvonta numero de AE, aŭ al Kunredaktisto Doran aŭ al la Centra Oficejo.

*"Amerika Esperantisto" estas la plej efika propagandilo por montri ke Esperanto vivas kaj progresas. Mendu ilin pogrande je favora prezo.*

## LA NEKONATA SOLDATO DE ESPERANTO

Tie li kuŝas — modesta la tombo,  
Kiel konvenas al lia agad'.  
Li ja laboris sen ia aplombo,  
En milradaro sin sentis nur rad'.

Altajn postenojn li ne ambiciis,  
Sed ĉiam pretis, se estis bezon':  
Kiam ajn io nebone funkciis,  
Tuj li sin metis je plena dispon'.

Stelon li ĉiam elmontris fiere,  
Frontis demandojn per scia kviet',  
Mokojn aŭskultis indulge, tolere,  
Venkis per sia trankvila ridet'.

Ĉiam regule li pagis kotizon,  
Grupajn kunvenojn vizitis sen mank',  
Eĉ ekstervice grupkasan la ftizon  
Helpis kuraci sen celo je dank'.

Li estis membro de l' universala,  
Ankaŭ sendube de l' fakasoci',  
Krome leganto de l' oficiala  
Kaj de aliaj gazetoj dek-tri.

Librojn aĉetis li tre diligente,  
Varbofoliojn disdonis laŭ pov',  
Ĉiam mallaŭte, senbrue, silente;  
Kaj ja ne vana montriĝis la prov'.

Tamen ne kedu lin homo havriĉa!  
Etiis nur lia enspezocifer'.  
Sed li sin sentis plej multe feliĉa,  
Sin oferante por granda afer'.

Tiel li agis, oferis kaj varbis,  
La nekonata kaj simpla soldat'.  
Lian rikolton aliaj surgarbis,  
Dum lin kaperis la Granda Pirat'.

Tiel li vivis, kaj tiel li mortis.  
Nun li jam kuŝas en eta terspac'.  
Eĉ la gazetoj pri li ne raportis,  
Sed — tutegale! Li dormu en pac'!

★

*Aŭtoro nekonata.  
Represita el "Paco kaj Justeco,"  
Brugge, Belgujo.*

---

### "KVIN-PUNKTA" PLANO DE D-RO CECIL STOCKARD ESTAS DIFINITA ADMINISTRA SISTEMO POR UNO

1) La centra registaro de la Unuigitaj Nacioj, (analoge je nia federa registaro), havos aŭtoritaton super aferoj kiuj koncernas du aŭ pli da nacioj.

2) Ĉiu membro-nacio, (analoge je niaj ŝtatoj de Usono), havos aŭtoritaton super siaj propraj internaj aferoj, sed nenian rajton por sin intermeti en la internajn aferojn de iu ajn alia nacio.

3) Sistemo de zorgato-ŝtatoj, (analoge je niaj multaj 'teritorioj' kiuj poste fariĝis ŝtatoj), estos starigitaj el venkitaj atakemaj nacioj kaj aliaj dependaj landoj kiuj ne estas pretaj por mem-regado.

4) Zorgato-ŝtatoj estos administritaj de la centra registaro por la profito de la loĝantaroj, kaj por fina mem-regado kaj eniro kiel membroj de la Unio.

5) La centra registaro estos tiamaniere organizita por ke ĝi plej bone efektivigu tiujn funkciojn.

*Rimarku:* la du partoj de Punkto II estas egale esencaj, kaj formas la kernon de la tuta plano — ĉio alia estas neĉefa. Sendu leterojn kaj demandojn pri ĉi tiu plano al: *D-ro Cecil Stockard, Professional Building, Bradenton, Florida.*

---

*Aliĝu al EANA kiel Subtenanto \$5, aŭ Patrono \$10, por fortigi la movadon.*

# THE ESPERANTO STUDENT

Here are some expressions needed in asking questions at the railroad station. In a number of countries in Europe you will find an Esperanto information desk and often an Esperanto porter. So be prepared! Only let your reasons for questions be more practical than S-ro Roberto's! Note especially the use of the adjective form of the number to express time, and also the way in which the little general preposition *je* is used. Check closely the Esperanto rendering of the impersonal expressions *It is . . . , There is . . .* Only the verb *estas* is used.

## In the Station

S-ro Roberto estas en la stacio. Li atendas la alvenon de sia fianĉino, Anĝelino. Li demandas de portisto.

R: Kioma horo estas, sinjoro?

P: Estas la naŭa horo.

R: H-m-m, ĉu vi scias kiam la vagonaro el Parizo alvenos?

P: Jes . . . je la deka hodiaŭ matene.

R: H-m-m. Mi devas atendi ankoraŭ unu horon. Estas nun la naŭa kaj tri minutoj. Kie estas la informejo, sinjoro?

P: Je la alia flanko de la stacidomo.

R: Bone, dankon. (Li iras tien, kaj demandas de la informisto.) La vagonaro el Parizo . . . ĉu ĝi alvenos akurate?

I: Jes, akurate je la deka.

R: Ĉu ĝi estas unua, dua, aŭ tria-klasa vagonaro?

I: Estas nur unua-klaso, sinjoro.

R: H-m-m. Do, ŝi vojaĝas en luksa vagono. Kiom kostas rond-vojaĝo al Parizo?

I: Kvincent sepdek-tri frankojn.

R: Ĉu vere? H-m-m, ŝi pagas sufiĉe multe!

I: Ĉu vi deziras bileton, sinjoro?

R: Ho, ne . . . sinjoro . . . ne! Mi restas ĉi tie. Sed . . . mia Anĝelino alvenos de Parizo je la deka. Mi nur scivolis *kiom multe* ŝi amas min! Sufiĉe multe! Jes, sufiĉe!

## En la Stacio

Mr. Roberto is in the station. He is awaiting the arrival of his fiancée, Angelina. He questions a porter.

R: What time is it, sir?

P: It is nine o'clock.

R: H-m-m, do you know when the train from Paris will arrive?

P: Yes . . . at ten this morning.

R: H-m-m. I must wait yet another hour. It is now three minutes past nine. Where is the information desk, sir?

P: On the other side of the railway station.

R: Very well, thanks. (He goes over there, and asks of the information clerk.) The train from Paris . . . will it arrive on time?

I: Yes, promptly at ten.

R: Is it a first, second, or third class train?

I: There is only first class, sir.

R: H-m-m. So, she is traveling in a luxurious car. How much does a round trip to Paris cost?

I: Five hundred seventy-three francs.

R: Really? H-m-m, she is paying enough!

I: Do you wish a ticket, sir?

R: Oh, no . . . sir . . . no! I am staying here. But . . . my Angelina will arrive from Paris at ten. I only wondered *how much* she loves me. Quite enough! Yes, enough!

## House or Apartment Wanted

*Desperately needed for December* or earlier house or apartment (3 or 4 bedrooms) New York or commuting distance. Dr. W. Solzbacher, 11 Lakeview Ave., Scarsdale, N.Y. — Tel. city CO 7-2375, Scarsdale 3825.

# KONVERĜA TEORIO PRI LUMINTENSECO

F. M. STEADMAN

*Tradukis Davido Jagerman*

*F. M. Steadman*, aŭtoro de *Home Portraiture* kaj *Unit Photography*, membro American Mathematical Society kaj Optical Society of America, petas aprobon aŭ kritikon de sia teorio. Adreso: 745 East 6th St., Beaumont, Calif.

Estas universale akceptita leĝo pri la lumintenseco kiu estas fundamente vera, sed kiun oni lasis neklarigita al studentoj. Tiu leĝo estas: "La areo de lumigata surfaco ne estas faktoro de ĝia heleco." Tiu vera leĝo nuligas la falsan leĝon pri la intenseco kiun oni instruas hodiaŭ en ĉiu licea fiziko-lernolibro en la mondo. Tiu erara leĝo estas: "La lumo malfortiĝas pro tio ke ĝi disvastiĝas ju pli foren ĝi iras for de originpunkto."

Ĉiu konata lumfonto havas mezureblan dimension, kaj du el ili kreas duoble tiom da forto kiom unu.

Se oni legas ĵurnalon per lumo tra fenestro, ĝi povas esti etendita aŭ ĝismalgrande faldita por kapti pli aŭ malpli da lumo sur ĝin, *sen ŝanĝo de la lumo uzata por legado*. La kialo por tio estas ke ĉiu litero estas lumigata sendepende, *per la radioj kiuj konverĝas sur ĝin*. Tio estas la klarigo de la vera leĝo supredirita. Por ŝanĝi la lumon, utilan por legado, estas necese supren aŭ malsupren tiri la rulkurtenon. *La intenseco-faktoro estas en la lumfonto, ne en la surfaco sur kiun la radioj etendiĝas*.

Teknike, la sendependa lumigata

punkto estas la individua surfaca molekulo.

Unu sola lumfonto je duona distanco kreas kvaroble la intensecon, ĉar ĝi estas kvaroble pli granda en spaco rilate al ĉiu punkto en la surfaco kiun ĝi lumigas kaj sur kiun ĝiaj radioj konverĝas. Tio estas la sama vero kiu funkcias kiam kvar flamoj kreas kvaroble la intensecon, je difinita distanco.

En la foto-aparato la lumigataj punktoj estas la sendependaj grajnoj de kemiaĵoj en la filmo dum la grandaj kaj malgrandaj aperturoj en la lenso provizas la grandajn kaj malgrandajn lumfontojn kiuj determinas la ekspondaŭron.

La konverĝa vero pri la lumintenseco estis kaŝita for de studentoj dum tricent jaroj, de kiam Kepler per la falsa teorio diris ke la lumo "malfortiĝas pro la disvastiĝado."

Se grupo da viroj kun pafiloj, uzante kugletojn, alpafas kaj mortigas birdon, la efikaj kugletoj estas tiuj kiuj konverĝas sur la birdon el la diversaj pafiloj. La kugletoj kiuj disiris kaj maltrafis la birdon ne efikis.

— F. M. S.

---

*Grava ekspozicio kaj propagando* por nia afero, okazos sub la gvidado de *Howard E. Latham, Caledonia, N. Y., Usono*. Helpu nian aferon, kaj sendu ĉiajn Esperantaĵojn, afiŝojn, lerojn, gazetojn, eldonaĵojn, k.t.p., al S-ro Latham je la adreso supre. Li tre volonte rekompencos sendkostojn per internaciaj respond-kuponoj, se vi notos tion je sendado.

*Abon-donacoj por Bibliotekoj* estas plej efika maniero por propagandi Esperanton. Ĉu vi re-abonigis vian liston? Se ne, faru ĝin tuj.

*Klubo Stelo-Libro* estas tre bona maniero por akiri novajn Eeperantolibrojn je favora malalta kosto. Petu informon.

## **LA MIRINDA VESPERTO**

*El "Steleto Rosaria," Argentino*

La vespereto estas nokta besteto, kiu ĉiam flugas en la mallumo. Ĉu ĝi do ne riskas kolizii kun arboj kaj konstruaĵoj? La vespereto tute ne povas vidi objektojn antaŭ ĝi. Certe ĝi devas uzi iun instinktan metodon por eviti danĝeron. Kaj vere, eksperimentoj antaŭnelonge pruvis, ke tiu stranga, eta besto senĉese ellasas akrajn kriojn — kiuj tute ne estas aŭdeblaj por la homa orelo — kaj ĝi analizas la ehojn, kiuj resonas de iu objekto. Tiu instinkta analizado ebligas al ili tuj scii kie staras objektoj, kaj tiamaniere ili kapablas flugi en la plej densa mallumo sen akcidento!

La suprajn faktojn raportis Doktoro Donald Griffin kaj Roberto Galambos de la Medicina Lernejo de Rochester, Usono. Kiam la du sciencistoj imagis al si, ke eble la vesperetoj ellasas supersonorajn sonojn, ili faris diversajn eksperimentojn pere de speciala ilo, kiu ebligas, ke oni aŭdu supersonorajn vibradojn. Ili tro-

vis, ke dum libera flugado la vespereto eligas ĉirkaŭ 30 kriojn ĉiusekunde, sed se estas antaŭ ili ia objekto, ili duobligas la nombron da krioj. La Doktoroj per tuko ligfermis la buŝon de kelkaj vesperetoj kaj poste liberigis ilin al flugo. Sed la kompatindaj vesperetoj tute ne sciis kien flugi. Ili nur ŝvebis en la aero. Kiam la Doktoroj ŝtopis la orelojn de la vesperetoj, estis same danĝere por la bestetoj, ĉar en tia okazo ili koliziis kun ĉirkaŭaj objektoj.

La vespereto, do, uzas tiun saman principon je kiu la radar-aparato estas bazita. Vere, mirindaĵo! Oni faris ja tian bruegon pri la eltrovo de la 'radar'-aparaton! Kaj tamen la vespereto, tiu malamata sed utila besteto, kiun ni foje vidas rapidege flugi en la mallumo de la nokto, jam ekde la kreo de la universo kunportis en sia malbela kapeto . . . "RADAR"-aparaton!

— *El "Steleto Rosaria"*

## **FEDERACIO DE UNUIGITA JUNULARO**

Mi ĵus elektigis kiel Esperanto-Redaktoro por la gazeto de la *Federacio de Unuigita Junularo*. Ĉi tiu organizo serĉas kunlaboron de elstarantaj partoprenantoj el ĉiu junular-organizo en la mondo. Ni eldonos gazeton nomitan *Earthlings* (Monduloj). Se iu interesiĝus pri kunlaboro kaj aliĝo, por helpi la organizadon de daŭra paco per la unuigitaj fortoj de la junularo, bonvolu skribi kaj indiki kiamaniere vi ŝatus helpi. La nuna bezono estas jene:

1) *Novaj membroj*. Oni povas akiri aliĝilojn de la *College of United Youth* (Kolegio de Unuigita Ju-

nularo), *Los Gatos, California*. Sendu, kun via letero, mem-adresitan koverton kaj aŭ poŝtmarkon aŭ korespond-kuponon.

2) *Elstaranta junular-estro* en ĉiu lando kaj landparto de la mondo, kiu povas verki aŭ paroladi por la nova organizo.

Aliĝo per sendo de dek cendoj aŭ du respond-kuponoj, kaj petu plian informon de la kolegia adreso supre. Oni ne necesas emfazi la urĝan bezonon por tuja agado. La atom-bombo minacas nin ĉiujn. Subskribis: *Richard Earnhart, Box 632, Kingsville, Texas, Usono*.

## ESPERANTO-KRONIKO

*En Instituto pri Internaciaj Rilatoj* por studentoj de duagradaj lernejoj, kiu okazis de la 15-a al la 22-a de Aŭgusto en Antioch College, Yellow Springs, Ohio, unu el la diskutgrupoj diskutis la problemon de internacia lingvo kaj decidis demandi pri tio D-ron W. Solzbacher, unu el la prelegistoj en la Instituto. Tio donis al li okazon prezenti en sia ĉefa vespera parolado klarigojn pri Esperanto. Montriĝis granda intereso. "Amerika Esperantisto" troviĝis en la librovendejo. La Instituto estis unu el tiuj organizitaj de la Kvakeroj (American Friends Service Committee).

*Biografio de F-ino Lidja Zamenhof*, plej juna filino de la Majstro, D-ro L. L. Zamenhof, estas verkota de F-ino Roan Orloff en Boston, laŭ speciala invito de Shoghi Effendi, Estro de la Baha'i-Movado, kies membro F-ino Zamenhof estis. Lidja Zamenhof estis persone konata al multaj usonanoj pro ŝia sukcesa agado en nia lando kiel Cseh-instruistino. Bedaŭrinde ŝajnas nun certe, ke ŝi estis mortigita de la Nazi-oj kun aliaj membroj de la familio Zamenhof.

*La Eduka Sekretario* de la Brita Esperantista Asocio, S-ro Montagu C. Butler, kiu ankaŭ estas redaktisto de la bonega gazeto "The British Esperantist," raportis en la BEA-Kongreso en Bristol, ke en dek jaroj (1936-46) li paroladis pri Esperanto en 1452 kunvenoj (inter ili 930 en lernejoj), kun ĉeesto de 121,235 infanoj, 4,233 instruistoj, kaj 15,931 aliaj personoj: sume 141,399. Okaze de la kunvenoj li vendis librojn je la valoro de 1,058 pundoj (preskaŭ 4,250 dolaroj), inter ili 69,000 ekzemplerojn de la anglalingva lernolibro "Esperanto for Beginners."

*Pastro Gabriel N. Pausback*, O. Carm., kunredaktoro de "AE," antaŭ nelonge forvojaĝis de Romo al la Insulo Malta. En Romo li organizis du Esperanto-kursojn. Pastro Pausback estas Vic-Generalo de la Karmela Ordeno, kiu estas tre grava en la Katolika Eklezio.

*Skoltoj en multaj landoj* nun studas Esperanton por la Jamboreo okazonta en Francujo en la somero de 1947. S-ro Stan Lešinger, agento de Skolta Esperantista Ligo por Ĉekoslovakujo, anoncis en la gazeto "Esperantista" (Praha), ke oni esperas Esperantistigi 50 ĝis 80 procentojn el la skoltoj partoprenontaj el tiu lando. Dum Jamboreoj en Hungarujo kaj Nederlando kaj dum Slava Jamboreo en Polujo 10 procentoj el la ĉekoslovakaj partoprenantoj estis Esperantistoj. Estas necese, ke ankaŭ en Usono kaj Kanado Esperantistoj pligrandigu siajn klopodojn por Esperantistigi la skoltojn ironantaj al Francujo! Pri Usona agado inter Skoltoj, George J. Falgier devis rezigni pro nova posteno en altlernejo kio necesas sian tutan tempon. Sed alia skoltestro konsentis alpreni la laboron de la Skolta Fako — li estas *Howard E. Latham, Caledonia, N.Y.* Skribu multnombre al li kun ofertoj de helpo, kaj por informo rilate al la skolta-agado.

*Bona faka gazeto en Esperanto* estas "La Interligilo," organo de ILEPTT (Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomuniko kaj Transportoj). La redakcejo kaj administrejo estas en Francujo, sed ĝi estas presata en Svedujo. Poŝtistoj, telegrafistoj, fervojistoj kaj radio-fakuloj trovos la enhavon interesa. Usona agento: S-ro F. G. Morin, 3451 Congress Street, Chicago 3, Illinois.

*Ĉiu Membro de EANA aŭtomate fariĝas Asocio-Membro de IEL. Sed por ricevi la Jarlibron kaj gazeton de IEL oni devas aparte fariĝi Individua Membro de IEL. Ĉef-Delegito D. E. Parrish, 328 W. 46 St., Los Angeles, Cal.*



## ESPERANTO-KRONIKO

*Ekzamena Komitato de EANA* (Profesoro Edwin L. Clarke, Estro) raportas gajnintojn de Atestoj jene: Pri Kapableco, *Philip Henry Hensley*, Tampa, Fla.; *Stuart Eugene Kittredge*, Hartford, Conn.; Pri Lernado, *Howard E. Latham*, Caledonia, N.Y.

*Elmira Esperanto-Klubo* presis unikan 'gazeton' poŝtkarte! Ĝi estas *Esperanto News* anglalingve (Vol. 1, No. 1), kaj tre lerte eldonita dorsflanke de poŝtkarto. Alia tre interesa eldonaĵo de la Elmira Klubo estas ilustrita poŝtkarto esperantlingve, pri la studejo de Mark Twain (fama usona humoristo). La klubo petas interŝanĝon per ilustritaj poŝtkartoj de ĉiu partoj de la mondo. Adreso: *Elmira Esperanto-Klubo, Eliza E. Smith, Prez., 401 West 1st St., Elmira, N.Y., Usono.*

*Tom Robbins*, Steep Falls, Maine, vendas frapantajn leterojn por sendado al diversaj ĵurnaloj. Lastatempe al *Portland Press-Herald*. Bona ekzemplo por ni ĉiuj — sendu leteretojn al redaktistoj.

*Centra Dana Esperantista Ligo* sukcesis igi la danan radiofonion akcepti disaŭdigon de 15-minuta prelego en Esperanto. Ili petas ke oni sendu gratul-leterojn al *Statsradiofonien, Kopenhago, Danlando.*

*Profesoro Dudley Brooks* reorganizas la Esperanto-klubon en Milwaukee, Wis. La nova grupo estas *Klubo de Esperanto-Korespondantoj*. Laŭdinda regulo de la societo estas ke ĉiu membro devas esti ankaŭ membro de EANA kaj IEL. Bravo! Kiuj kluboj sekvos tiun bonan ekzemplon?

*S-ro O. W. Allen*, Rockville Centre, N.Y., estas varme bonvenita en niaj rondoj. Li lerte instruas Esperanton en sia alternejo nun. Dum la milito li konatiĝis kun diversaj el la plej famaj Esperantistoj en Eŭropo, speciale Franclando.

*S-ano Charles Chomette*, tutmonde konata patro de Esperanto-familio en Los Angeles, ofte gastigas samideanojn el la plej diversaj lokoj de la mondo. Lastatempe *Leŭt. Francis Fan* de Ĉinujo vizitis dum kvin tagoj. *Kapitano David Farrell* estas alia konato, kiu aliĝis al EANA pro la varbado de S-ano Chomette. Ni dankas — kaj petas pli da varbado!

*Etry Graeffe*, antaŭe en Fargo, Nord-Dakoto, vizitis la Centran Oficejon survoje al rond-vojaĝo tra Eŭropo por la Baha'i-Organizo. Ŝi poste troviĝos en la Internacia Baha'i-Oficejo, Genevo, Svislando.

*Edward J. Excell*, Toronto, Kanado, sukcesis enmeti bonegan instigon por lernado de Esperanto, en la organon de la kompanio "Eaton" (nome *Flash*). S-ro Excell laboras en tiu kompanio. Ni gratulas pro efika maniero de Esperanto-propagando.

*Walter Ryan*, antaŭnelonge de Anglujo, estas "nova sango" por nia Nov-Jorka movado, pro tio ke li havis bonan sperton en Anglujo, kaj estas tre efika propagandisto. Li jam faris diversajn paroladojn pri Esperanto en la domoj YMCA en Nov-Jorko kaj Bruklino. La organo "Sloane House News," Aŭg. 26, presis artikolon pri lia parolado tie. Ni anticipas multan sukceson de la Esperanto-faroj de S-ro Ryan.

*Prof. A. Pennekamp*, Immanuel Lutheran College, Greensboro, N.C. starigis Esperanto-kurson kun ses kursanoj. Ni atendas pli da bona novaĵo pri liaj faroj en Nord-Karolino.

*Internacia Ligo Esperantista "Gardeno"* esperas organizi grandan rondon post la milito. Ĝardenistoj kaj ĉiuj similaj profesianoj, eĉ amikoj de ĝardenoj, aliĝu al kunlaboro fondi tiun ligon. Detalaĵoj respondas *Lad. Kynčl, floristo, Palmovka, Praba VIII, Ĉekoslovakio.*

## DEZIRAS KORESPONDI

*Anglujo.* S-ino Brenda M. Delgado, Church Cottage, Ratcliffe Currey, Otherstone, Warwicks. 28-jara lernejestrino, dez. kor. pri literaturo lingvoj, vivmanieroj kaj P.M.

*Bulgarujo.* Trifon, Borisov, Str. Aleksandar I 66, Ruse. 20-j. radioteknikisto, dez. kor. pri radio, tonfilmo, k.c.

*Ĉeĥoslovakio.* J. Bujas, M. Ostrava-Vitkovice, TRPL. Ŝvece. Instruisto dez. kor. pri ĉio. Certa respondo.

*Ĉeĥoslovakio.* S-ino Milda Yakubcova, Potacelova 70, BRNO 15. Latvino dez. kor. kun Usonanoj.

*Ĉeĥoslovakio.* S-ro Dalibor Vererka, Merhautova 146, BRNO. Juna viro dez. kor. kun fraŭlinoj interŝ. PK, gazetojn.

*Danujo.* S-ro B. Anderson, Teglvarksalle 11, Aalborg. 37-j. instruisto, interesigas pri Esperanto-instruado al infanoj, dez. kor.

*Danujo.* A. V. Jensen, Skottenberg 10, Viborg. Sperta Esperantisto dez. kor. kaj interŝ. P.M.

*Finlando.* Tauno Nurmio, Metsakansa. Dez. kor. kun juna komencanta Esperantist(in)o Usona.

*Francujo.* Mme. Erna Jahnig, 2 rue Blainville, Paris 5e. Infano-resteĵo ekster Parizo dez. kor. kun aliaj junuloj.

*Francujo.* F-ino Madeleine - Laure Mercier, Kerr Gast, 42 rue Roger Salengro, Angers (Maine et Loire). 24-jara, dez. kor. kaj interŝ. PK kun Amerikanoj.

*Germanujo.* Kurt Gorr, Berlin-Waidmannslust, Zehntwerderweg 88. 37-j. komizo dez. kor.

*Hungarujo.* S-ro Jozsef Pava, Pecs, Pf 80. 31-j. ŝtata oficisto dez. kor.

*Jugoslavio.* Slobodan Velicki, "Geografski Institut T.A.," Beograd-Kalemegdan. 21-j., dez. kor. kun amerikanoj samagaj. Interŝ. bildojn de urboj kaj landoj.

*Nederlando.* Y. T. A. Mars, Singelstraat 2g, Utrecht. 26-j. fraŭlo, bankoficisto tre dez. kor. kun Usonaj junuloj.

*Nederlando.* A. Aafeber, Sumatrastr. 56, Amsterdam. Carpentristo dez. kor.

*Usono.* Herbert Beazley, 2417 Blodgett, Houston, Texas. 15-j. dez. kor. kun la tuta mondo. Certa respondo.

*Ĉinujo.* S-ro Turkin, c/o Ĉengtua Esperanto-Ligo, P.O. Box 77, Chengtu. 22-j. ĵurnalisto dez. kor. tutmonde, precipe kun negroj.

*Usono.* S-ro Howard Latham, Box 75, Caledonia, N.Y. Dez. ekz. de ĵurnaloj, eldonaĵoj Esperantaj por ekspozicio en lernejoj. Rekompencos vin pro sendado.

*Argentino.* Horacio M. Garcia Coni, Sarandi 157 Cap. Dez. kor.

*Aŭstrujo.* Johann Jungschaffer, Ried i. I. Lerneja direktoro dez. interŝ. bele afrankitajn, se eble aerpoŝtajn leterkovertojn.

*Aŭstrujo.* F-ino Paula Kraue, Thaliastr. 106/8, Vienna XVI. Dez. kor. kun amerikanoj pri ĉio interesa en la nuna tempo.

*Brazilo.* S-ro F. Doblas Filho, Av. 13 de Maio 44-13º, Rio de Janeiro, dez. kor.

*Svedujo.* S-ro Frank Johannsson, Ostervagen 23, Rasunda. 39-j. komercisto en Stokholmo, interesigas pri sportoj, lingvoj, dez. kor.

*Hungarujo.* Aleksandro Kassai, Berkocsi-u. 5, Budafok. Sperta Esperantisto dez. kor., interŝ. P.M.

*Italujo.* S-ro Nicola Guidone, Plebiscito 18, Spinazzola (Bari). Studento de lingvoj en Instituto Universitario Orientale en Napoli, bezonas unulingvan anglan vortaron, dez. kor.

*Ĉeĥoslovakujo.* Anoj de Polica Esperanto-Rondo dez. kor. kun policistoj tutmonde. S-ro V. Zamostny, Palackeho 26, Praha-XI.

## ESPERANTO BOOKS

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp. (war-time edition) .....	.25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition) .....	.75c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Butler. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp. .... Paper, .80c; Cloth, \$1.25	\$1.25
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. S. Benson. Unique picture-method with 650 illustrations, English text, and Vocabulary. 80 pp. ....	.25c
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO, Dr. Wm. S. Benson. "The only book of its kind in the world". 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and tables of correlatives in 36 languages. Direct picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary (fully illustrated with common words given in 40 languages), and index. A unique and encyclopedic book. 560 pp. .... cloth bound, stamped in gold	\$4.00
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp. ....	.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. .... cloth	\$5.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, by Major-General Cox. A complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. ..Cloth	\$2.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. .. .10c; 3 for .20c; 10 for .50c	.50c
10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE, French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto, 10 languages, including Esperanto, in a nutshell. 110 pp. .... Paper .50c; Cloth	\$1.50
EDINBURGH DICTIONARY, Eng-Esp and Esp-Eng, 288 pp, best concise dict..	\$1.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition) .....	.30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
KARLO, Edmond Privat. Easy first-reader in Esperanto. 44 pp. ....	.30c
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp. .... .15c, 10 for	\$1.00
ESPERANTO-SORTIMENTO: <i>Ginevra</i> , Privat; <i>Princo Vanc'</i> , Putnam-Bates; <i>Blanche</i> , Payson; <i>Miserere kaj Thais</i> , Payson; <i>La Rozujo Ĉiumiljara</i> , Payson; <i>La Akrobato de Nia Sinjorino</i> , Payson. Good Esperanto reading at bargain prices to reduce stocks .....	.25c each; all 6 for \$1.00
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp. ....	.75c
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.25. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
LA FINO, by Count Bernadotte, world best-seller, popular edition, paper .....	\$1.00
JUNECO KAJ AMO (Legendo el Venecio), Edw. S. Payson. .... Cloth	.50c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. .... Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano .....	.25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center .....	.65c

### YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

114 W. 16 St., New York 11, N. Y

## MAYBE ENGLISH WILL DO ???

If you pronounce head, dead and bead,  
You'll hear the last word rhymes with deed,  
And in this "poem" you will find  
Many items of this kind,

For instance:

Dear and fear and hear but bear,  
Gear and tear but "wear and tear,"  
Yeast and least and pleased but pleasant,  
Beast but breast and pease but peasant,  
Meat and peat but sweat and great,  
(The last word rhymes with freight and weight),  
Quite different again is height,  
Which sounds like bite, indict and light.

The next line should be read with care:  
The praying prayer says his prayer.  
Bean and lean and mean but meant;  
Note "g" in get, in gem and gent.  
Vice but crevice — advice — device,  
Lice but malice — police — concise.

We say dreamt but also dreamed,  
(The latter rhyming with esteemed),  
Crew and blew and few but sew,  
Cow and row but sow and row.  
Measles does not sound like measure;  
The same applies to treason — treasure.  
Braid and maid and laid but said.  
Treat but threat and thread and tread,  
Asp and wasp and rasp — all three  
Are different in sound, you see!

Composed in Japanese detention pen  
By H. L. Vogelesang  
From "The Knickerbocker Weekly"